Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
**MondaFest' • La Monda Festivalo de Esperanto • 20 junio – 20 septembro**

# Festivala Kuriero

**02-a de aŭgusto 2020, numero 6**
Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## Inaŭguro de la Internacia Kongresa Universitato




**Amri Wandel prezentas la Kongresan Universitaton**

Tuj post la Solena Malfermo de la Virtuala Kongreso okazis la tradicia Inaŭguro de la Internacia Kongresa Universitato (IKU). Koncizan historion de IKU, de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kaj la komunajn IKU-AIS sesiojn prezentis Amri Wandel, Prezidanto de AIS kaj UEA-estrarano pri Scienca kaj Faka Agado. Sekve la ĉi-jara IKU-Rektoro, Geoffrey Greatrex, prezentis la 73-an IKU-sesion. La sep IKU-prelegantoj prezentis sin kaj siajn prelegojn. Sekve prezentis sin la kvar prelegantoj de la Scienca Kafejo. En la lasta parto Amri rakontis pri sia koncepto de IKU – aplikata dum lia 25-jara deĵorado kiel estrarano respondeca pri IKU kaj IKU-sekretario: ke IKU prelegoj ne pretendas esti vere universitat-nivelaj, sed "popular-sciencaj" – en la senco ke ili ĉefe celas klerigi interesiĝantajn kongresanojn. Fine Amri prezentis la IKU-libron: la kolekton de tekstoj de la IKU-AIS prelegoj, verkitaj de ĉiu preleganto, kaj eldonatan de UEA ĉiujare ekde 1998. Preskaŭ ĉiuj IKU-libroj estas rete haveblaj en la IKU-paĝo de UEA: https://uea.org/kongresoj/universitato, kie antaŭ kelkaj tagoj aldoniĝis la IKU-libroj de 2018 (Lisbono) kaj 2019 (Lahtio). La IKU-libro ĉi-jara estas senpage atingebla ĉe http://iku.trovu.com: jam pli ol 1500 personoj ĝin elŝutis.




**François Lo Jacomo prezentas siajn prelegojn pri la Ora Nombro**

## Spektu diversajn kanadajn filmojn

Spektu diversajn kanadajn filmojn, kiuj estis montritaj dum la «antaŭkongreso» de la VK (Virtuala Kongreso)! Klaku "Plena programo" ĉe https://vk.retevent.com kaj ĝuu la spektadon, eĉ se vi preterlasis la premierojn.



***Momentum (Movokvanto)* de Colin Low & Tony Ianzelo**



***Eks-infano* de Jacques Drouin**




***La Seĝa Rakonto* de Norman McLaren**

# Kelkaj universitatanoj ekpaŝas en kunpensado pri konkreta projekto

**En la *Festivala Kuriero* ni jam skribis, ke kadre de MondaFest' okazas kunvenoj pri Esperanto en universitatoj (t.n. kunpensadoj). Nun la Universitato de Sevilo proponas la iniciaton, diskutindan dum la Virtuala Kongreso.**

Ni deziras realigi Internacian Reton de Universitatoj (IRU). La celo estas konvinki niajn reprezentantojn subskribi kaj apogi reton, kiu zorgos pri internacia kaj interkultura komunikado nehegemonia. Ene de tia celo troviĝas aliaj pli konkretaj: helpi afrikajn universitatojn, stimuli en okcidentaj universitatoj la lernado de minacataj lingvoj, fortigi Esperanton kiel universitatan laboran lingvon, realigi kursojn pri internacia komunikado sen kultura malekvilibro, faciligi internaciajn universitatajn projektojn pere de Esperanto ktp.



Pri la maniero labori, ni decidas atingi tiun celon sen urĝo, paŝon post paŝo kaj ĝuante la vojon. Gravega maniero sukcesi estas atingi la partoprenon de kolegoj el malsamaj kulturoj. Male, ni maltrafos kaj vojon kaj celon. En la nuna VK ni aranĝos spacon kaj tempon kunveni. Ĉar ni loĝas en la mondo, ni havas malsamajn horarojn. Bonvole, se vi havas intereson partopreni (aktive aŭ ne) sendu personan retmesaĝon al Viko (viko@us.es) menciante al li, kiam estos bona momento por vi, aŭ kiam vi ne povos partopreni.

# Faka Forumo dum la Virtuala Kongreso

Dimanĉe okazis la Faka Forumo sub la gvido de Amri Wandel, estrarano de UEA pri Faka kaj Scienca agado. Partoprenis ĉ. 50 personoj, kiuj prezentis ĉ. dudek Fakajn Asociojn. La renkontiĝo okazis per Zoom, kiu ebligis al multaj partoporeni kaj kontribui, demandi kaj sugesti. Aparte menciindas la sinprezentoj de tri novaj Fakaj Asocioj: Teamanta Esperanto-Organizo (TEO), kiun la Komitato akceptis kiel nova Kunlaboranta Faka Asocio en junio, Monda Spiritisma Asocio (MSA) kies aliĝpeto estas nun traktata, kaj Muzika Esperanto-Ligo (MEL), kiun grupo de aktivuloj nun provas revivigi, post multjara stagnado.

Estis sukcese plenumita la oficiala priskribo, "En la Faka Forumo la Fakaj Asocioj koncize prezentas sin kaj interŝanĝas spertojn kaj kunlaborajn planojn". Multaj partoprenantoj restis post la planita tempo. Krom la sinprezentoj de Fakaj Asocioj, estis faritaj kelkaj valoraj proponoj, ekzemple Rodica Todor (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio) proponis ke virtuala evento, simila al la Faka Forumo, okazu plurfoje dum la jaro. Alia propono estis ke UEA liveru al la Fakaj Asocioj la kontaktojn de la Fak-delegitoj de la koncernaj fakoj, ĉar ofte tiuj delegitoj aliĝas al UEA ne per la Faka Asocio.

Teknika komento: la plena 1:20-hora kunveno estis registrita, sed ĉar la Faka Forumo okazis per Zoom kaj ne per la ĝenerala VK-platformo, ĝi ne estis tuj havebla por (re)spektado post la fino de la programo. Ĝi tamen baldaŭ estos videbla en *UEAviva* (https://www.youtube.com/user/UEAviva) kaj eventuale ankaŭ per la VK-retejo.




**Movadaj insuletoj**
Vivo kaj agado de esperantistoj en Indonezio.
**Heidi Goes.**

Rotterdam:
Universala Esperanto-Asocio, 2018.
287p. 25 cm. Bind. Ilus. € 42,90

Vi povas esti aŭtoro de la *Festivala Kuriero* kaj la Reta Revuo! Por kontribui, skribu al la redakcio redakcio@revuoesperanto.org

# La Virtuala Movada Foiro sukcesas kaj mojosas!



La Virtuala Movada Foiro okazigis jam dekojn da belaj prezentoj kaj babiladoj, kiujn partoprenas aro da diversaj Esperanto-organizoj, grupoj kaj projektoj.

Ekzemple, grandan sukceson havis la «budo» pri KER-ekzamenoj (vi povas spekti la prezenton ĉe https://mallonge.net/59)! Ĝi okazis kadre de la Virtuala Kongreso de Esperanto. Aliĝu al la VK, se vi ankoraŭ ne aliĝis, kaj invitu viajn konatojn fari tion, estos ankoraŭ multo interesa: https://vk.mondafest.net/

# Kurso de Esperanto por hispanparolantoj sukcesas

Venu kaj vidu, kiel funkcias la kurso de Esperanto por hispanparolantoj, al kiu apartenas 34 instruistoj kaj iom pli ol 300 gelernantoj.







# Muzika programo dum la Virtuala Kongreso!

Aldoniĝis muzika programo! 6 koncertoj okazos dum ĉi tiu Virtuala Kongreso! Kontrolu en la "Plena programo" ĉe https://vk.retevent.com (en la supra serĉbreto de la retpaĝo tajpu "koncerto"). Horoj sube estas laŭ UTC.

**4-a de aŭgusto 2020**
16:30 - 17:00 — Koncerto: Kaŝi

**5-a de aŭgusto 2020**
17:15 - 18:00 — Koncerto: Ĵomart kaj Nataŝa




Foto de Andrzej So-cki

**6-a de aŭgusto 2020**
15:00 - 15:30 — Koncerto: Perla Mielo (Gyöngyi Mézes), profesia artistino pri perkutinstrumentoj

**7-a de aŭgusto 2020**
13:30 - 14:00 — Koncerto: jOmO



**8-a de aŭgusto 2020**
12:00 - 12:30 — Koncerto: Amir Naor – judaj kantoj
15:00 - 16:00 — Koncerto: Gijom': "Kaj ĉio ĉesis"




# Recenzo: *Esperanto por mi. 16 esperantistoj portretitaj de Helga Plötner.*

## Nova tre interesa libro de Horizonto (Hori Jasuo, Japanio)

Ricevinte la libron, tuj okulfrapis min la ruĝa-flava kovrilpaĝo kun verda stelo. Sur tiu ĉi kovrilpaĝo estas videblaj la 16 portretitoj en miniatura formato kaj tiel ĝi donas al la legontoj la unuan rigardon en la enhavon kaj scivolemigas ilin.

En mallongaj, tamen informplenaj tekstoj la desegnistino kaj la redaktanto rakontas al la legontoj historieton pri la instigo, kreado kaj evoluo de la ideo por krei tiaspecan libron kaj ĝian longan vojon de la komenco ĝis la preta libro kun artaĵoj, eseetoj kaj fotoj.




Ĉe la unua trafoliumado la atenton kaptas la diversstile desegnitaj portretoj. Foje kun fajnaj diferencoj en la linioj faritaj per malmola krajono, foje kun molaj, iom pli dikaj linioj faritaj per mola krajono aŭ per nigra kreto. La elekto de tiuj du desegnostiloj estas tre trafe farita kaj konvenas al la portretitoj. Tamen ĉiu desegnaĵo havas sian specifaĵon kaj estas nekomparebla unu kun la alia. Je la dua, pli preciza observado de la desegnaĵoj oni povas nur konjekti, kiom da laboro, peno kaj sindonemo entenas ĉiu bildo. Dum plurfoja longa rigardo ĉiam denove videblas rimarkindaj detaloj en la desegnaĵoj. La konscia ludo kun lumo kaj ombro en la portretoj lasas ekkoni la majstrinon en sia fako.

La kombinado de desegnaĵoj kaj aldonitaj fotoj de la portretitaj famuloj plivigligas la paĝojn, la eseojn, kaj donas etoson familian. Per unupaĝaj, kelkaj kortuŝaj, sinprezentoj rakontas la portretitoj pri siaj unuaj kontaktoj kun Esperanto kaj pri instigoj lerni, instrui ĝin aŭ eĉ verki librojn Esperantajn. Ĉiuj rakontas ankaŭ pri tio, kiel Esperanto fascinas ilin. Interese estas ekscii pri la impresa, sindonema agado, laborado,verkado kaj instruado de tiuj 16 eminentaj personoj, eĉ se oni jam konas unu aŭ alian de la portretitoj. Ili rakontas en la eseoj ankaŭ pri si mem, mencias konatajn-nekonatajn, privatajn aferojn, sortojn kaj feliĉigajn eventojn. La libro prezentas al la leganto ne nur aktivajn pensiulojn, sed ankaŭ junajn engaĝiĝintajn esperantistojn el diversaj landoj. La eseoj respegulas la tre diversajn agadkampojn de ĉiuj portretitaj esperantistoj, kiuj havas la saman celon: disvastigi Esperanton kaj per tiu laboro provi plibonigi la mondon. La etaj personaj verkoj interese, impone vagadigas la legantojn tra eventoplenaj jardekoj de la komenco de la 20-a jarcento ĝis la nuntempo.

En la antaŭlasta paĝo la leganto ekscias pri la longa, impresa agado de la portretistino por Esperanto. Estas vere menciindaj la vivofazoj kaj sukcesoj per la amata, fascina, magia, mondo-kuniganta, entuziasmiga lingvo de la Majstro L. L. Zamenhof. Lia portreto far Helga Plötner troviĝas sur la dorsa flanko de la libro kun verda skribaĵo: „Danke al via mirinda lingvo ni havas Esperon al nia estonteco.“ La verko evidente montras, kiom multon eblas fari dum la vivo por Esperanto kaj por ĝia progresado. La unuaj kelkaj eseoj instigis min tuj finlegi ĉi tiun impresan desegnaĵ-libron je unu sido.

Estas en plano eldoni duan libron kun portretoj de 16 aliaj aktivaj esperantistoj. Tio denove estos laborego kun geamikoj el multaj landoj laŭ proponlisto de nia tre aktiva, japana amiko Hori Jasuo. La nuna eldono aperis en 300 ekzempleroj kaj la plej multaj jam estas fordonacitaj al la portretitoj kaj geamikoj. Revenis bona eĥo kaj gratuloj el la tuta mondo.

Kiu deziras akiri tiun valoran libron (prezo 5 €), skribu rapide al helga.ploetner@gmx.de aŭ telefonu al +49 173 7731545. Ĝi estas mendebla ankaŭ per la libroservo de UEA, azianoj povas kontakti ankaŭ horizonto@r.water.sannet.ne.jp.

*Ralf Haumer / Helga Plötner*
*Korekt- kaj kontrollegado Zsófia Kóródy*